

La Kalumeto

la bulteno de “Projekto Indiĝenaj Popoloj »
januaro-marto 2011

« Projekto Indiĝenaj Popoloj » celas prezenti Esperanton al indiĝenaj popoloj tra la mondo kaj faciligi komunikadon inter indiĝenaj popoloj kaj individuoj per Esperanto. Ĝi celas ankaŭ informi esperantistojn pri la situacioj de indiĝenaj popoloj kaj pri kiel popoloj indiĝenaj kaj ne-indiĝenaj povas interagi. Ni kredas ke indiĝenaj popoloj ofte alfrontas similajn situaciojn, exemple: perdoj de terenoj, mondoperceptoj, kaj tradicioj. Ni plu kredas ke komunikado, per Esperanto aŭ alimaniere, helpas indiĝenojn subteni unu la alian kaj pli bone diskonigi siajn kulturojn. Samtempe, PIP komprenas ke multaj indiĝenaj grupoj sentas profundan bezonon revivigi, gardi, kaj antaŭenigi siajn proprajn lingvojn.

Au'skultado

En numero 245 de Literatura Foiro, legeblas artikolo de Ruben ALVES, “La arto au'skulti”. Kvankam s-ro Alves tre, eĉ tro, forte esprimas sian temon, la artikolo estas valora ĉar ĝi rememoras nin pri la fakto ke komunikado ne estas nur parolado, skribado, kaj simile; komunikado ankau' inkludas au'skultadon.

Lau' Alves, au'skultado eligas nin el niaj internaj mondoj kaj interagigas nin kun la mondoj de aliaj personoj. Tiu, kiu parte, ne plene, au'skultas estas tiu, kiu au'das la vortojn de alia persono dum li au' ŝi pripensas kiel strukturi sian respondon.

Alves lau'das la komunikad-manieron de kelkaj indiĝenaj grupoj. Lau' la metodo de tiuj grupoj, iu parolas kaj alia(j) persono(j) au'skultas, au' simple ricevas la informojn au' memesprimon de tiu persono. Poste okazas silento dum kiu la au'skultinto(j) pripensas la informojn kaj preparas reagon au' respondon. Nur tiam la auskultinto(j) respondas parole (kaj la parolinto iĝas au'skultanto). Kiel diras Alves, “La longa silento signifas: ‘Mi estas zorge rezonanta pri tio, kion vi diris.’ Kaj tiel dau'ras la kunveno. Ne sufiĉas la ekstera silento, estas necese la interna silento. Malesto de pensoj. Kaj tiam, kiam okazas la interna silento, oni ekau'das aferojn, kiuj ne povis esti au'ditaj.

“Mi komencis au'skulti.”

Kvankam s-ro Alves ne menciis la problemojn kiuj povas okazi inter personoj el diversaj kulturoj, multaj homoj jam lernis pri la graveco de zorgema au'skultado kiam ekzistas malsameco de kulturo/mondopercepto. Alimaniere, la komunikado iĝas nur kvazau'komunikado, kaj la rezulto de la “konversacio” povas esti ke ĉiu flanko eble opinias ke la alia estas stulta, nerespوندهca, malbonhumora, nekunlaborema, au' simile.

S-ro Alves “komencis au'skulti”. Ni ĉiuj bezonas same fari.

Demando kaj respondo—indiane

Intervjuo kun usona aktoro indiana James LUNA. Ĉi tiu intervjuo okazis post kiam

s-ro Luna staris, dum la Tago de Kristoforo Kolombo je 2010, antaŭ Union Station, grandega fervojo-stacio en Vaŝingtono, Usono.

Kio inspiris la roladon ĉe Union Station?

Dum mi vojaĝis en sudokcidenta Usono, mi pasigis iom da tempo en tre fora regiono de la navahoa rezervejo. Apud la ŝoseo estis indiano kiu portis la insignaron de la militodanco, apud malbone organizita juvelaro-budo. Sed tiu, kiu sciis ion ajn pri tiu indiana kulturo, sciis ke tiu vestaro ne estas vere triba insignaro. Tio estis iom humiliga, kvankam la viro perlaboris sian vivrimedojn. Poste, mi estis dum jaro en Vaŝingtono; estis antaŭ la loĝloko de la prezidanto plataj, hom-grandaj figuroj de la prezidanto apud kiuj oni povus fotiĝi. Mi pensis, "Ha! Sufiĉe mojosa."

Kiel via prezentado funkcias?

Starante ĉe podio kaj uzante indianan insignaron, mi anoncas, "Fotiĝu kun vera indiano. Fotiĝu ĉi tie en Vaŝingtono ĉi tiun belan matenon, okaze de ĉi tiu bela festotago, kiun oni nomas la Tago de Kristoforo Kolombo. Usonanoj amas diri ke ni estas 'iliaj indianoj'. Al usonanoj multe plaĉas ke ni dancu por ili. Al usonoj tre plaĉas ke iliaj au'toj kaj kamionoj havu niajn tribo-nomojn. Fotiĝu ĉi tie hodiaŭ', je ĉi tiu sunoplena tago en Vaŝingtono." Poste, mi nur staras. Iam unu persono pozas kun mi. Post tio, la homoj viciĝos. Mi faros tion dum iom da tempo, ĝis kiam mi sufiĉe koleriĝos au' humiliĝos.

La humiliĝo estas duflanka.

Ĉu vi opinias ke la au'dantaro estas ero de via prezentado? Jes. La homoj sin prezentas por ke oni prenu foton de ili kun indiano, kiel oni fotus ilin kun la tau'ro-skulptaĵo [simbolo de riĉeco] ĉe Wall-strato. La okazo disponeblas. Indianoj estis ĉiam ekspluateblaj, kaj mi kredas ke homoj ne bone komprenas ke ni ne estas aĵoj ekspluateblaj. Mia identigebleco kiel indiano ne signifas ke mi esta ekspluatebla.

Sed finfine, mia agado estas deklaro de mi mem por esprimi mian vidpunkton pri la interagado inter la ĝenerala loĝantaro kaj indianoj, kaj la kelkfoja emocieco de la ĝenerala loĝanto pri ni.

Lau' via opinio, kio estas "vera" indiano?

Unu el la plej maltrankviligaj demandoj kiujn mi au'das estas, "Ĉu vi estas purrasa?" Lau' mi, indiano estas antaŭ ĉio persono kiu estas kulture indiĝena. Tia persono scias al kiu tribo li au' ŝi apartenas, konas sian kulturan fonon kaj siajn "indiĝenajn agadmanierojn," kiel ni diras inter ni.

(Fonto: Smithsonian-magazino, januaro 2011, eldonita de la Institucio Smithsonian, Usono)

Ekster-eu'ropigo de Esperanto

Gutoj falas, falas...kaj ŝtono dispecetiĝas. Diverskulturdivenaj vortoj en Esperanto uziĝas, uziĝas...kaj Esperanto ekster-eu'ropiĝas. La komparo ne estas tre lerta, sed

mi esperas ke ĝi komunikas ĝeneralan ideon.

Ĉu uzanto de la Esperanto-ero de Interreto okaze visitas na “Bonalingvo” de Renato Corsetti kaj Ana Loŭenstein, au’ na “afrika-kulturo-en-esperanto,” ambau’ ĉe “google groups”? Se jes, tiu vizitanto certe rimarkas ke vortoj el diversaj afrikaj lingvoj aperas lau’ esperantigitaj formoj por integriĝi je la vortoprovizo de Esperanto.

Ĉu tio nur estas furoro? Ĉu la vortoj plejparte uziĝos nur je afrikaj/afrikecaj situacioj? Ĉu baldau’ aliaj mondoregionoj simile kontribuos al la ekster-eu’ropigo de Esperanto? Ĉu la artikol-verkanto iam haltigos sian demando-faradon? La respondo al la lasta demando estas “jes”. Krom tio, nur la diligenteco de afrikaj esperantistoj kaj la uzado de elektitaj vortoj fare de multaj, diverskulturaj esperantistoj montros ĉu afrikaj lingvoj faros gravajn kontribuojn al la vortprovizo de Esperanto.

Leganto respondas

Antau’e legando demandis, “Ni esperantistoj ne bezonas la indiĝenajn lingvojn Kiel kampanji por ili?”

Ĉi-numere legeblas la respondo de leganto KIMURA Goro:

“Mi ne certas kiom serioze al tiu demando respondi. Mi nur ŝatus scii, kion tiu leganto al indiĝenoj respondus: “Ni indiĝenoj ne bezonas Esperanton. Kial vi kampanjas por ĝi?”

“Certe tiu persono havus respondon (mi esperas). Same, indiĝenoj certe havus respondon, kial ni bezonas siajn lingvojn. Se ni respektos kaj au’skultos iliajn opiniojn, ili ankau’ respektos kaj au’skultos la niajn.

“Mi persone opinias ke la Esperanto-movado estas ero de movado por prilingva egaleco, i.a. tiuj de indiĝenaj popoloj kiuj suferas je lingva malegaleco.”

Impresita kaj Kortuŝita

Ruba Ruba apartenas al la etno “paiwan”, kiu vivas proksime de la urbo Pingtung sude de Tajvano. Ŝi estas 86-jara. Ŝi ne kapablas legi nek skribi. Ekde 1964, ŝi dedikas sian tempon al la kutimaj manlaboroj de sia popolo. Dum nia ekskurso al la montaro (en la jaro 2009) ni atingis ŝain vilaĝon kaj trovis ŝin tute hazarde Ŝi estis teksanta pere de sekigitaj folioj de “yuetao”. Mi estis impresita de ŝia vigla rigardo.

Ni alvenis el la vilaĝo de la popolo paiwan: Ingrid, tajvana esperantistino, Saburo, tajvana esperantisto, profesoro pri la angla kaj la japana, Golam, irana esperantisto, amiko de Reza kaj mi. Mi volis foti kaj mi promenis sur la placo. Tra la fenestro mi vidis na Ruba Ruba dum teksado. Oni montris al ni ke ni rajtis eniri la domon. Interparolado komenciĝis inter Ingrid kaj Ruba Ruba en la ĉina lingvo. Tre rapide mi komprenis, ke ni tiam estis en neforgesebla momento, en ekstraordinara kontakto. Post ĉirkau’ dudek minutoj, mi sugestis al Ingrid ke ŝi telefonu al la du viroj kiuj restis sur la teraso de la restoracio, por ke ili venu.

Ili alvenis. Saburo observis (Ili klarigis tion al mi poste, ĉar dum la interparolado estis klare ke ni ne volis perdi tempon en diversaj komentoj) ke Ruba Ruba malfacile parolis la ĉinan kun eksterlanda akĉento kaj uzante multajn japanajn

vortojn. Pro tio li parolis al ŝi en la japana lingvo. La kontaktoj fariĝis viglaj kaj interesegaj. Ruba Ruba diris mallongajn frazojn kaj parolis ĉion tre klare. (...) Oni ne rajtas forgesi, ke Japanio havis Tajvanon kiel kolonion de 1895 ĝis 1945. Tio estis la kau'zo kial Ruba Ruba parolis krom sia etna lingvo la japanan.

Ŝi montris al ni multajn artikolojn kiuj aperis pri ŝi. Ŝi vidiĝis en televido. Ŝi vojaĝis por paroli en universitatoj en Tajvano, Japanio, Germanio, Usono. Ŝi montris al ni diversajn diplomojn. Ŝajnas ke Tajvano havas la saman sistemon de vivantaj naciaj trezoroj kiel Japanio. Ŝi eble jam estas au' devas esti tia vivanta trezoro.

Ŝi montris al ni sian domon el ŝtonoj. Mi observis la ŝtonajn portilojn fungoformajn, kiuj portas la grajnorezervojn. Mi konas tiun formon, kiu estas uzata en la svisaj Alpoj en Valezo, por eviti ke musoj formanĝu la grajnoj. Mi petis ke ŝi klarigu pri tiu formo. Ŝi konfirmis. Ŝi konstatis, ke mi konas kaj komprenas, kaj niaj amikaj rilatoj komenciĝis.

Homoj foje staras antaŭ' problemo, kiel tiu de la musoj kiuj formanĝas la grajnon. Okazas ke, hazarde en du finoj de la mondo, ili alvenis al la sama solvo.

Ruba Ruba parolis pri montoj. Ŝi diris: "Ekzistas viraj montoj kaj inaj montoj. Kiam vira monto kuniĝas kun ina monto, ili ĝas kune kaj elvenas likvaĵo, kiu estas la origino de la rivero."

Ruba Ruba interesiĝis pri mi. Ŝi atente observis mian vizaĝon, ŝi prenis miajn manojn, ŝi tenis miajn manojn, ŝi observis ilin. Ŝi diris: "Vi rigardas ĉirkau' vi, vi volas kompreni tion, kion vi vidas, poste vi klarigas tion al la aliaj. Vi senĉese laboras, vi neniam ripozas.". Mi estis tre impresita kaj kortuŝita. Mi pasigis du horojn kun ŝi, du neforgeseblajn horojn.

Mireille/Mirejo Grosjean afable kontribuis ĉi tiun tekston el sia blogo, ĉe mirejo.blogspot.com, 13an de aprilo 2009. Ankau' aperas tie fotoj.

Antaŭ' Vi

Verkita honore je ekspozicio de olmea sculpt-arto en Losanĝeleso, Kalifornio, Usono

Vi

Malaperis

Inter riveroj

La kotaj terenoj malaltaj

Multkolora ĝangalo

Koloro formita kontraŭ' fono de ĉielo el obsidiana vitro

Kie steloj

Kiam ili kolektiĝas

Ekrakontas historion.

Pri la soleca
Nepenetrebla ĝangalo
Kaj la pluvoj
Gutadadaj
La jaguaro emerĝas
La ploregantaj beboj ankoraŭ ploras
Fantomaj fingroj
Lau'iras la formojn de
Viaj lipoj
Olmeko
Vi estas Meksiko
Vi estas Afriko
Tiuj flamoformaj brovoj estas ankau' miaj
Memore je vi
Sako da ostoj
Eroj
La etaj poluritaj ŝtonoj
Aranĝitaj petaloforme
Ruĝ-spegula suno
Ruĝa sunleviĝo
Respegulas vian ĉeeston
Ĵetas sian lumon
Sur tion kio ankoraŭ ekzistas
Inter la transplantuloj
Kiel losanĝelesaj palmoj
Strat-lau'irantoj de Wilshire-Bulvardo

Kiuj pilgrimos por stari antaŭ'
Via severa fiksrigardo
Ili lasos oferaĵojn
Blu-verdaj, diafanaj koroj el jado
Piedsigne ni montros
Kiel oni sin direktu
Ni okupas nian lokon antaŭ' la entombigo
Sub vualo el vermiljona polvo
Ni malaperis
Inter riveroj
Okaze de viaj ĉeestoj
Ni ekpaŝas la senfinan hejmeniran padon
Verkis (s-ino) Marisela NORTE

Usono

Rimarko: La poemo pritraktas kaj erojn de la olmekaulpt-arto kaj distingaĵojn de la ekspozicio, ekzemple, la nomon de la bulvardo kie estas la muzeo en kiu la ekspozicio okazas, kaj la estado de multaj palmoj en la urbo, malgraŭ tio ke palmoj ne estas indiĝenaj plantospecoj. Ankau' interesa esta la uzo de la frazo "vualo de vermiljona polvo," pro tio ke multaj kulturoj en la regiono de la olmekoj vide elstarigis siajn incizitajn imagojn per frotmeti ruĝan polvon en la incizitajn liniojn. Simile, la vortoj "jaguaro," kaj "ploregantaj beboj," aludas al oftaj skulptotemoj, kaj la frazeto "la formojn de viaj lipoj" aludas al la forte stiligitaj lipoj de multaj skulptitaj vizaĝoj olmekaj.

Antaŭ' Ni povas memorigi al ni ke kulturo nun apenau' atingebla al ni pro informo-manko estis sia-epoke forta, vigla, kaj eĉ gvideca al postaj kulturoj.

Tiu monato nomiĝas...

La monato-nomoj de diversaj indiĝenaj lingvoj montras klare kiel la parolantoj vivis (au' ankoraŭ vivas) kaj kiuj plantoj kaj bestoj estis al ili gravaj.

Jen kelkaj diversgentaj monatonomoj:

Ĉasi kun hundoj

Arboburĝono

Aglo

Haroj sur fokidoj en la utero

Nuksoj

Boacidoj naskiĝas au' boacolakto aperas

Kelkaj monoatonomoj ne rilatas je plantoj au' bestoj:

Migri al au'tuna kampadejo

Duon-vintro

Seka tendo

Granda malvarmo

Riverbordo

Spino (por signifi "jar-mezo"-n)

Alia interesa distingaĵo pri la monato en pluraj indiĝenaj kulturoj rilatas je monato-longeco. Kvankam "monato" tipe estas luno-ciklo, en pluraj kulturoj eblas plilongigi monaton ĝis kiam iu evento (ekzemple, boacid-naskiĝo) okazos.

(Fonto: When Languages Die [Kiam Lingvoj Mortas] de K. David K. Harrison)

La Mortiga Suno Mortas

Rakonto de la ĝuruna-gento de Brazilo

Iam, kiam junulo ĉasis en la ĝangalo, li iris por trinki el akvofonto kiun la Suno posedis. La junulo enmetis sian manon por preni akvon, sed la fonto kaptis lian manon kaj tenis lin por ke la Suno mortigu lin.

Kiam la Suno alvenis al la fonto, li vidis ke li havis kaptiton, sed li opiniis ke la junulo jam estis mortinta, ĉar li ruze restis senmova kaj senresponda. La Suno metis la junulon en grandan korbon ka hejmenportis lin. Hejmenveninte, la suno metis la junulon en malplenan arbotrunkon.

Dum la nokto, la junulo alvokis al la ĝangalobestoj por ke ili helpu lin. Multaj bestoj alvenis por mordeti la arbotrunkon; post noktodaŭ'ra mordetado kaj fosado fare de la bestoj, la junulo eskapis kaj reiris hejmen. Li diris al sia patrino ke la Suno preskau' mortigis lin, kaj la patrino ploris pro timo kaj malĝojo.

Kiam la junulo decidis eniri denove la ĝangalon por serĉi manĝaĵojn, la patrino petegis al li ke li ne iru, sed la knabo sentis ke la suno ne rekonos lin, ĉar li aliigis sian mienon.

Tamen, la Suno rekonis la junulon kiam li hazarde ekvidis lin. Pro tio, la junulo devis mortigi la sunon; tion li faris per ĵeti al la sunon pezan kokosaron el palmo kie li kolektis la fruktojn.

La mortigo de la suno kau'zis teruran problemon de malbona sano por la homaro. Multaj personoj mortis pro lumomanko.

La vidvino de la Suno parolis ku siaj tri filoj. Ŝi diris al ili ke ilia patro mortis pro sia emo mortigi aliulojn. Poste ŝi diris ke unu el ili devos doni lumon al la mondo por ke la vivestaĵoj vivadu.

Ĉiu filo surmetis la sunan kapornamon kaj penis transmarŝi la ĉielon, sed nur la pli juna povis toleri la varmegon kiun li travivis dum li sunopadiris. Per la gvidado de la patrino, la juna filo lernis kiel realigi siajn ĉielajn respondecojn.

Tiam, ĉiuj ĝojegis pro la ĉiutaga reapero de la vivodona sunlumo. Nur ploris la patrino de la nova, knaba Suno, ĉar li neniam povos reiri kun ŝi; li devos dediĉi sin al sia gravega, ĉiela agado.

(Fonto: Family of Earth and Sky [Familio de Tero kaj Ĉielo], redaktis John ELDER kaj Hertha D. WONG.)

Projekto Indiĝenaj Popoloj

Aliĝu! Informiĝu! Partoprenu!

Erik Felker—PIP ejfelker@dslextrreme.com

414 E. Cedar Ave., Apt. 11 / Burbank CA 91501 / USA-Usono